**AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO (AEA)**
**NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO (NZEA)**

# SOMER-KURSARO
# KAJ
# KONGRESO

**6 – 15 Januaro 2023**

**International House**
**241 Royal Parade, Parkville 3052**
**Melburno, Aŭstralio**

## SALUTMESAĜO

Bonvenon al Melburno.

Bonvenon al nia kongreso/somerlernejo de 2023. Ĉi tiu estas kuna evento de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

La estraroj de la du landoj provis organizi kiel eble plej interesan Esperanto-eventon.

Ni bonŝancas pro tio, ke finfine ĉeestos Katalin Kováts el Nederlando/Hungario, unu el la ĉefaj longjaraj motoroj de nia bela lingvo.

Ni speciale dankas ĉiujn partoprenantojn kiuj prezentos erojn, gvidos aŭ organizos diversajn eventojn. Tiun ĉi kongreson organizas kaj okazigas manpleno da voluntuloj. Se aŭ kiam okazas misaĵoj, bonvolu memori tion kaj estu ĝentila kun ili.

Memoru ke neniu el ni estas denaska parolanto de Esperanto. Estu pacienca kun komencantoj.

Ne forgesu fari belajn kaj interesajn fotojn dum la semajno kaj partoprenu nian fotokonkurson.

Nome de AEA kaj NZEA, ni deziras al vi agrablan, amuzan, kaj fruktodonan tempon dum la somerkursaro kaj en Melburno.

Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Paŭlo, Sandor, Terry (AEA)
Bradley (NZEA)

## FOTOKONKURSO

Faru elektronikajn fotojn dum la kongreso kaj pri la kongreso.
Sendu ilin al Jonathan (drdada@gmail.com).
Certigu, ke la foto(j) ne estu pli granda(j) ol 5MB.
Maksimume 10 fotoj de ĉiu konkursanto.

Limdato:
**Vendredo, 13-a Jan 2023, je 19:30**
La fotoj estos montrataj dum la lasta vespero (sabato) kaj la tri plej bonaj gajnos premiojn.



La gajninta foto de 2019

# PROGRAMO

## Vendredo, 6-a Januaro

13:00 – 18 :00 Registrado
18:00 – 19 :30 Komuna vespermanĝo
19:30 – 22 :00 **Neformala babilado**

## Sabato, 7-a Januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo
**09:00 – 10:00** **Malferma ceremonio** *(Estraroj)*
10:00 – 10:30 **Esperanto-kursoj:**
**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*
Tiu kurso por progresantoj havas la celon reviziti la bazajn regulojn de Esperanto, paroligante la ĉeestantojn.
**Spertuloj *(Katalin KOVÁTS)***
10:30 – 11:0 Kafopaŭzo
**11:00 – 12:15** **Esperanto-kursoj**
**12:15 – 12:30** **Kongresa Foto 1**
12:30 – 13:30 Tagmanĝo
**14:00 – 15:00** **Mondaj heridaĵoj** *(Sandor HORVATH)*
Mallonga vojaĝo al kelkaj famaj kaj ne tiel famaj mondaj heridaĵoj. Problemoj kun kelkaj de ili.
15:00 – 15:30 **Ĝismorte mi atestos (Parto 1)** *(Trevor STEELE)*
La germana judo Victor Klemperer registris en sia taglibro ne nur la teruran persekutadon de judoj en hitlera Germanio, sed ankaŭ la ĉiuragajn humiligojn kaj ĉikanojn. Lia verko estas nun mondfama. Klemperer postvivis la 12 jarojn de la Tria Regno, grandparte dank' al la heroeco de sia nejuda edzino, Eva.
15:30 – 16:00 Kafopaŭzo
16:00 – 17:00 **Kiel agadis por Esperanto niaj prauloj antaŭ 100 jaroj** *(Katalin KOVÁTS)*
Inkluzive de Andreo Cseh kaj Tiberio Morariu kaj la E-vivo antaŭ 90–100 jaroj, ĉefe en Eŭropo
17:00 – 18:00 **Rigardo ĉe kantoj laŭ lirikverkista vidpunkto** *(Kam Lee)*
(Nun movita al mardo, la 10-a de januaro, je 19:30)
18:00 – 19:30 Vespermanĝo
**19:30 – 21:30** **Teatraĵoj** *(Marumi Smith)*
La komencantoj kaj progresantoj de la Melburna Esperanto-Asocio montros du mallongajn satirajn teatraĵojn. La unua, *Felix*, verkita de Oscar Betancourt, asertas ke la mondo de Esperanto certe uzeblas por amikecoj same kiel por iuj komercaj aspektoj. La dua, verkita de Marumi Smith, estas simpla, simbola peco, en kiu demono povus iĝi homaro-amanta estaĵo post injekto per anĝelo de la amhormono, oksitocino. Larissa, ukraina rifuĝinto, partoprenos en tiu teatraĵo, emfazante la urĝajn bezonojn por la monda paco.

**Sankta Circla Danco** *(Heather Heldzingen & Esther Parris)*

## Dimanĉo, 8-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*<br>**Spertuloj** *(Katalin KOVÁTS)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **UN kaj nia agado** *(Humphrey TONKIN)*<br>Humphrey parolos pri UN kaj nia agado tie. Li ankaŭ proponos al AEA, ke ĝi faru specialajn paŝojn por festi la ĉiujaran Esperanto-Tagon (26 julio), pro tri kialoj. |
| **15:00 – 15:30** | **Ĝismorte mi atestos (Parto 2)** *(Trevor STEELE)*<br>Daŭrigo de sabato, 7 Januaro, 15:00 |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Nekutimaj mapoj** *(Helen PALMER)*<br>Helen vere ŝatas mapojn. Ŝi prezentos diversajn al la grupo kaj estos multaj oportunoj por diveni aj dividi kelkajn de viaj pensoj. |
| **17:00 – 18:00** | **Jarkunveno de AEA** (Eblos ankaŭ partopreni per Zoom.) |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 21:30** | **Ludvespero** *(Joanne JOHNS)*<br>Venu kaj ludu! Elektu el kelkaj tabulludoj ludeblaj en Esperanto, inkluzive de Homlupoj, Codewords: Pictures, Hanabi, Mysterium, Kartoj Kontraŭ Esperantujo, Diru Ne Diru, Dixit, Spyfall, Friday the 13th, kai pli! |

## Lundo, 9-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*<br>**Spertuloj** *(Katalin KOVÁTS)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **UEA respondas** *(Duncan CHARTERS)*<br>Nia UEA-prezidanto respondos al demandoj pri sia Novjara Mesaĝo*, kaj daŭraj proponoj pri Strategia Planado de UEA.<br>[* Trovebla en la decembra numero de *Esperanto*, la revuo de UEA.] |
| **13:30 – 15:30** | **Radiostacio 3ZZZ en Melburno: Kiel kontribui al nia Esperanta radio-programo**<br>*(Franciska TOUBALE & Heather HELDZINGEN)* |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **La Ligo de Nacioj kaj Esperanto** *(Trevor STEELE)*<br>Oni fondis la Ligon de Nacioj post la Unua Mondmilito kiel rimedon por konservi pacon. Malgraŭ bonaj intencoj ĝi fiaskis. Ĉu tio havas sekvojn por nia nuna situacio? |

**17:00 – 17:30** **Sandor Petőfi, la plej fama hungara poeto, naskiĝis antaŭ 200 jaroj** *(Istvan SZABOLCS)*
Istvan prezentos la vivon kaj la signifon de tiu plej fama hungara poeto. Li ankaŭ deklamos du poemojn kaj diskutos kelkajn tradukproblemojn.

18:00 – 19:30 Vespermanĝo

**19:30 – 21:00** **IKAN (Internacia Kampanjo por Nuligi Nukleajn Armilojn)**
Antaŭ 10 jaroj, malgranda aŭstralia grupo lanĉis universalan kampanjon kun la celo malpermesi nukleajn armilojn. Ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Julio 2017, 122 registaroj voĉdonis por tiu traktato. La Nobel Pac-Premio estis aljuĝita al IKAN en 2017 pro sia laboro. Joanne JOHNS prezentos nome de IKAN Aŭstralio. Prof. Tilman Ruff (kunfondinto de IKAN) respondos al viaj demandoj. Jennifer BISHOP (Britio) tradukis la materialon al Esperanto. Marumi SMITH organizis.

## Mardo, 10-a Januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo

**09:00 – 17:00** **Tuttaga ekskurso**

**10:00 – 12:00** **CERES (Centre for Education and Research in Environmental Strategies)**
CERES Community Environment Park estas 4,5-hektara media eduka centro kaj socia entrepreno, situanta en urba Brunswick. CERES signifas Centro por Edukado kaj Esplorado en Mediaj Strategioj.

**14:00 – 16:00** **STRATARTO DE MELBURNO** *(Marumi SMITH & Kam LEE)*
La mond-famaj scenejoj de la Melburna Murskribaĉoj estos eslploritaj dum du hora promenvojaĝo. Ĝi inkluzivas “AC/DC Lane”, “Jungle Funk” kaj la historia Block Arcade. Kam Lee parolos pri la artistoj, motivoj kaj farbmaterialoj. Ni finos ĉe kafejo en Federation Square. (Senkosta)

*aŭ*

**PRAMŜIPO AL WILLIAMSTOWN**
*Kosto: $29.00*

18:30 – 19:30 Vespermanĝo

**19:30 – 21:30** **Rigardo ĉe kantoj laŭ lirikverkista vidpunkto** ***(Kam Lee)***
La prezentado temas pri la lirikoj de modernaj rokmuzikaj kantoj, rilate al evoluado de la temo, uzo de rimo, ktp. Tiuj kantoj estos diskutataj:
**1)** *Pasio en Katen’,* de Roĝer Borĝes kaj Jimes Milanez
**2)** *Anstataŭ Letero,* de Martin Wiese
**3)** *Parto de Mi,* de Katy Perr kaj aliaj
***4)*** *Reva Vi*, de Joanne kaj Peter Johns

# Melburna Kongreso: Vendredon, 6-an – Dimanĉon, 15-an de Januaro

| | Ven 6 | Sab 7 | Dim 8 | Lun 9 | Mar 10 | Mer 11 | Jaŭ 12 | Ven 13 | Sab 14 | Dim 15 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 07:00–08:30 | | Matenmanĝo | | | Matenmanĝo | | | Matenmanĝo | | |
| 09:00 | | Malfermo | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Tuttaga ekskurso**<br>**CERES**<br>**Per BOATO al WILLIAMS-TOWN**<br>**aŭ**<br>**STRAT-ARTO de MEL-BURNO** | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | Adiaŭi<br><br>Bonan vojaĝon |
| 10:30 | | **Kafopaŭzo** | | | | **Kafopaŭzo** | | | | |
| 11:00 | | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | **Kurso** *Giles* / *Kata lin* | |
| 12:30 | | **Tagmanĝo** | **Komuna Foto-1** | | | **Tagmanĝo** | | **Komuna Foto-2** | | |
| 14:00 | | **Mondheridaĵo** *Sandor H.* | **UN-Nia agado** *Humphrey Tonkin* | **2023 mesaĝo** *Duncan Charters* | | **Estonteco-AI** *Joanne J.* | **Melburna Art Galerio** *Jonathan C.* | **Vitroarto +** *Katalin K.* | **Komputiloj** *Patrick&Matt* | |
| 15:00 | **Alveno Registrado** | **Ĝismorte-1** | **Ĝismorte-2** | 3 ZZZ | | **Lingvaĵoj-01** | | **Lingvaĵoj-02** | **Skulptado** | |
| 15:30 | | **Kafopaŭzo** | | | | **Kafopaŭzo** | | **Kafopaŭzo** | | |
| 16:00 | | **E. antaŭ 100j** *Katalin K.* | Mapoj *Helen Palmer* | **Ligo de Nacioj** *Trevor Steele* | | **Agadi por E** *Katalin K.* | | **Artpresado Fotografio** *Jonathan C.* | **Bestremburado** *Joanne J.* | |
| 17:00 | | | AEA Jarkunveno | **Sandor Petőfi** *Istvan Szabolcs* | | **Bahaismo** *Paul Desailly* | **La Buĉejo** *Joanne J.* | **Rompitaj Labirintoj** *Kit Kelen* | **Pacifika progreso** *Stefan MacGill* | |
| 18:00 | | Vespermanĝo | | Vespermanĝo | | | Vespermanĝo | | **Bankedo**<br><br>**Dancado Teatraĵoj Foto Konkurso** | |
| 19:30 | **Neformala Babilado** | **Teatraĵoj** *Marumi*<br><br>**Sankta Circla Dancado** *Heather, Esther* | **Lud Vespero** *Joanne J.* | **ICAN** *Joanne J.* | **Kantoj&Lirikoj** *Kam Lee* | **Galerio** *Charles, Katja, Jo* | **Defiio de vivo** *Katalin K.* | **Ventro-dancado "Shimmering Flames"** | | |
| 22:00 | | | | | | | | | | |

## Merkredo, 11-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*<br>**Spertuloj** *(Katalin KOVÁTS)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Bonvenon al la estonteco: AI por verkado kaj arto**<br>*(Joanne JOHNS)*<br>Lernu pri la nunaj kapabloj de artefaritaj inteligentecoj en la sfero de verkado / babilado kaj kreado de artaĵoj. Ni kune babilos kun AI kaj kune kreos arton. |
| **15:00 – 15:30** | **Lingvaĵoj 1** *(Trevor STEELE)*<br>Trevor esploros kaj prezentos kelkajn amuzajn aspektojn de nia lingvo. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Kiel ni agadas por Esperanto komence de la 21a jarcento**<br>*(Katalin KOVÁTS)*<br>Daŭrigo de la antaŭa temo, pri nuna instruado, varbado, manieroj, defioj, malfacilaĵoj, kursoj, edukado.net, kaj KER-ekzamenoj. |
| **17:00 – 17:30** | **Kio distingas la bahaan kredon de aliaj mondreligioj?**<br>(Paul DESAILLY)<br>Parte por disvastigi bahaismon, parte por esperantigi miajn samreligianojn, kaj parte por pruvi, ke la Fondinto, Baha'u'llah (1817–1892) jam en 1890 estis esperantisto, mi prezentos tiun sesion. Bonvolu komenti je la anglalingva traduko por helpi la bahaanaron: bit.ly/bahai-desailly – PD |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 20:30** | **(Lanĉo de la libro *Galerio de Esperantistoj en Aŭstralio***<br>*(Charles STEVENSON, Katja STEELE, Joanne JOHNS)* |

## Ĵaŭdo, 12-a Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*<br>**Spertuloj** *(Katalin KOVÁTS)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 17:00** | **Vizito al melburna Art-galerio (NGV)**<br>Jonathan Cooper gvidos nin *neformale*. Ebla kromkosto |
| **17:00 – 17:30** | **Legado de *La Buĉejo*** *(Joanne JOHNS)*<br>Aŭskultu la skizan komencon de mia traduko de *The Killing Floor* de Lee Childs |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |

**19:30 – 22:30** **Defio en nia vivo** *(Katalin KOVÁTS)*
Amuza raporto pri nia 4-taga marŝado de 140 km inter 44 mil homoj - partopreno en la plej granda amasmarŝado de la mondo, kie ni reklamis Esperanton

## Vendredo, 13-a Januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo
**09:00 – 10:30** **Esperanto-kursoj:**
**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*
***Spertuloj*** *(Katalin KOVÁTS)*
10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
**11:00 – 12:15** **Esperanto-kursoj**
**12:15 – 12:30** **Kongresa Foto 2**
12:30 – 13:30 Tagmanĝo
**14:00 – 15:00** **Miaj vitroarto kaj artaĵoj de Juvelina** *(Katalin KOVÁTS)*
15:00 – 15:30 **Lingvaĵoj 2** *(Trevor STEELE)*
Trevor esploros kaj prezentos kelkajn amuzajn aspektojn de nia lingvo.
15:30 – 16:00 Kafopaŭzo
**16:00 – 17:00** **Arto multobla: Artpresado kaj Fotografio** *(Jonathan COOPER)*
**17:00 – 17:30** **Rompitaj Labirintoj** *(Kit KELEN)*
Kit lanĉos sian dulingvan libron virtuale. Li esploras kelkajn traduk-problemojn kaj ankaŭ dividas interesajn faktojn de sia famila historio.
18:00 – 19:30 Vespermanĝo
**19:30 – 20:00** **Prezentado de "Shimmering Flames", ventrodancada grupo el Melburno**
**20:00 – 22:00** (Anoncota)

## Sabato, 14-a Januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo
**09:00 – 10:30** **Esperanto-kursoj:**
**Progresintoj** *(Giles THOMPSON)*
***Spertuloj*** *(Katalin KOVÁTS)*
10:30 – 11:00 Kafopaŭzo
**11:00 – 12:30** **Esperanto-kursoj**
12:30 – 13:30 Tagmanĝo
**14:00 – 15:00** **Amuziĝu en la garaĝo kun Patrick kaj Matt**
*(Patrick NASH & Matt BESHARA)*
Praktika pruvo pri kiel konverti malnovajn aŭ nunajn komputilojn por operacii en Esperanta teksto/labortabla medio uzante Linukson Minto.
Kongresanoj bonvenas kunporti "funkciantan tekkomputilon" se ili deziras esti gvidata pri instalado de Linukso Minto en Esperanto.
**15:00 – 15:30** **Skulptado** *(Jonathan COOPER)*
15:30 – 16:00 Kafopaŭzo

**16:00 – 17:00** **Bestremburado *(taxidermy)*** *(Joanne JOHNS)*
Aŭskultu miajn spertojn farante kurson pri bestremburado kaj vidu la finan rezulton: beletan remburitan kokidon!
**AVERTO**: La prelego enhavos grafikajn fotojn de mortintaj bestoj**.**

**17:00 – 18:00** **Pacifika progreso** *(Stefan MACGILL)*
La evoluo de Esperanto en la pacifika regiono

18:30 – 22:30 **Bankedo,**
**Fotokonkurso, Atestiloj**
**Teatraĵoj: *Unua ladevuo*, *Injekto de Okcitosino***

## Dimanĉo, 15-a Januaro

07:00 – 08:30 Matenmanĝo

**09:00** **Forveturo: Bonan vojaĝon!**

# LA ESPERO

1.

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

2.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

3.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.